Laciĝis Tago

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Laciĝis tago kaj foriras
Kaj mi laciĝis de kurad'
Nenion mi deziras, nenion mi deziras
Rakontu ion kamarad'

Rakontu pri vojaĝoj longaj
Pri renkontiĝoj kun amik'
Kaj pri amikaj rondoj, kaj pri amikaj rondoj
Rakontu do atendas mi.

Mallaûte sonu voĉo via
Kaj iomete estu ni
Humormelankoliaj, humormelankoliaj
Revenis kvazaû la juni'

Ni rememoras la someron
Duope kantas en silent'
Trapasu la vespero, trapasu la vespero
kaj ruĝa estu orient'

Kaj ne malhelpu telefono
Forgesu ĉion ĝis aûror.
Nenion mi bezonas, nenion mi bezonas
Foriru do animdolor'

Laciĝis tago kaj foriras…